Informilo de Januaro 2019

Numero 38, januaro 2019

La Universala Deklaracio 70-jara: UEA emfazas homajn rajtojn

Universala Esperanto-Asocio

Universala Esperanto-Asocio cirkuligis fortan deklaron okaze de la Tago de Homaj Rajtoj 2018 kaj la Sepdeka Datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, emfazante la fakton, ke, tra la mondo “ĉie la homaro frontas diskriminacion (interalie diskriminacion surbaze de la lingvo), uzadon de perforto anstataŭ paca dialogo, kaj forgesemon antaŭ la lecionoj de la historio.” UEA, klarigis la deklaro, enskribis la homajn rajtojn en sian statuton unu jaron antaŭ la Universala Deklaracio, en la jaro 1947. Krome, la ĉiujara festado de la naskiĝo de frua apoganto de homaj rajtoj, Ludoviko Zamenhof, la fondinto de Esperanto, okazas la 15-an de decembro, samsemaje kiel Homrajta Tago. Jen la plena teksto de la deklaro de UEA:

“Okaze de la Tago de Homaj Rajtoj, la **10-a de decembro 2018**, kaj festado de la 70-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, akceptita je tiu dato en la jaro 1948, Universala Esperanto-Asocio samtempe gratulas al Unuiĝintaj Nacioj pro ties konstanta, persista kaj longdaŭra defendo de la homaj rajtoj tra la mondo, kaj atentigas ke, pli ol iam ajn antaŭe, la popoloj de la mondo bezonas la Deklaracion kaj la principojn kiujn ĝi entenas.

“Ĉie la homaro frontas diskriminacion (interalie diskriminacion surbaze de la lingvo), uzadon de perforto anstataŭ paca dialogo, kaj forgesemon antaŭ la lecionoj de la historio.

“La Universala Esperanto-Asocio (UEA) deklaras sian solidarecon kun la principoj de homaj rajtoj kaj kun Unuiĝintaj Nacioj en ties strebado realigi tiujn principojn.

“Fondita en 1908, UEA – la ĉefa monda asocio por la uzado kaj disvastigo de la internacia lingvo Esperanto – dekomence laboris por la ideoj de homa egaleco kaj tutmonda interkompreniĝo.

“Kvardek jarojn poste, jam antaŭ la akcepto de la Deklaracio fare de Unuiĝintaj Nacioj, la Asocio enskribis respekton al la homaj rajtoj en sia Statuto kiel esencan kondiĉon por sia agado. Nuntempe ĝi aktivas por dissemi informojn pri homaj rajtoj en pli ol 120 landoj.

“Homrajta Tago proksime koincidas kun alia ĉiujara festo – tiu de la naskiĝo de d-ro Ludoviko Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, kiu dediĉis sian vivon al la interfratiĝo de la homaro kaj kies naskiĝtagon oni festas la 15-an de decembro. ‘Absoluta justeco, egaleco kaj frateco inter la popoloj en la praktiko estas plene ebla,’ Zamenhof asertis en 1905.

“‘Ĉiu lando,’ li deklaris en 1906, ‘apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj,” kaj “en sia familia vivo ĉiu homo havas plenan, naturan kaj nedisputeblan rajton, paroli kian lingvon aŭ dialekton li volas kaj konfesi kian religion li volas’ – sed tion fari en harmonio kun tiuj kiuj praktikas alian lingvon aŭ alian religion. Pro tio li rekomendis Esperanton kiel internacian lingvon por la tuta homaro.

“Hodiaŭ UEA substrekas la kongruon inter la klopodoj de Zamenhof kaj la streboj por plene universaligi la homajn rajtojn. La Asocio invitas ĉiujn defendantojn de la homaj rajtoj konsciiĝi pri la graveco de lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco en la laboro por atingi pli justan kaj pacan mondon kaj konfirmas sian plenan subtenon de la idealoj de la Universala Deklaracio.”

Universala Esperanto-Asocio ĉe UNESKO

“Komuniki, Informi, Dialogi” estis la ĉefa temo de la Internacia Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj, kiu okazis en la sidejo de UNESKO en Parizo (Francio) de la 17a ĝis la 19a de decembro 2018. Pli ol 400 NROj rendevuiis por diskuti inter si kiel plibonigi la rilatojn inter la NROj mem sed ĉefe inter la NROJ kaj UNESKO, la NROj kaj la konstantaj delegacioj ĉe UNESKO aŭ la naciaj komisionoj.

Se, kiel diris Ambasadoro Ghazi Ghrairi, konstanta delegito de Tunizio ĉe UNESKO, “La NROj estas hejme ĉi-tie,” ne ĉiam facilas diskonigi la faritan laboron surlokan fare de la NROj, nek diskonigi siajn vidpunktojn. Gravas la organizado de Forumoj (en Tunizio pri migrantoj, en Moskvo pri sciencoj — en kiuj partoprenis reprezentantoj de UEA), eĉ se subvenciataj de ŝtatoj aŭ Fondaĵoj; sed lamas la plusekvoj, ofte pro manko de financado.

Elektiĝis nova Ligokomitato, sub prezido de Marie-Claude Machon-Honoré el BPW International (Internacia Federacio de Entreprenistinoj kaj Profesiulinoj). Ne mankis sugestoj kaj proponoj pri organizado de Forumoj, sed UEA ĉefe atentos pri la Internacia Jaro de la Indiĝenaj Popoloj.

NOTU LA DATON!
Simpozio pri multlingvismo en internaciaj organizaĵoj okazos la 9-an kaj 10-an de majo

Lingvoj kaj lingvaj diferencoj estas dimensio ofte subtaksata aŭ ignorata en la efikeco de Unuiĝintaj Nacioj sur multaj kampoj – de administrado ĝis ekonomia kaj socia evoluigo, de packonservado al diplomatio, kaj en multaj ceteraj terenoj. La Studogrupo pri Lingvo kaj

Unuiĝintaj Nacioj, fondita parte laŭ iniciato de Universala Esperanto-Asocio, organizas jam de kelkaj jaroj ĉiujaran simpozion pri aspektoj de lingvoj en rilato al UN. La ĉi-jara simpozio, “Unuiĝintaj Nacioj 75-jara: Aŭskultado, parolado kaj agado en multlingva mondo,” okazos ĵaŭdon kaj vendredon, la 9-an kaj 10-an de majo, ĉe 777 United Nations Plaza, Novjorko, komence je la 9-a horo la 9-an de majo. Alvoko por referaĵoj: www.languageandtheun.org.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041
www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041